



# BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBAHN

Numero 2 • Marto/Aprilo 1959

## Tiaj ni estas!

„Ni aranĝis letervesperon, kiu bone sukcesis. Ni ricevis multnombrajn kartojn kaj leterojn el eksterlando, eĉ el Usono, sed eĉ ne unu simplan salutkarton ni ricevis de samlandanoj aŭ germanaj fervojistoj esperantistaj.“ Tiel raportas s-ano el niaj grupoj, kaj multaj el ni aŭ eble ĉiuj substrekas tion, spertintaj saman.

Jes — tiaj ni estas — kaj ni ĉiam miras, ke nia movado stagnas kaj ne aliĝas novaj adeptoj al niaj vicoj.

Ĉu ne ni mem estas kulpaj, ke ĉio iras tian hontindan vojon? Ĉu ni faris sufiĉan, ĉiu je sia posteno?

Ni memoru ĉiuj precipe en la nuna Zamenhofa jubilea jaro, ke ni iam estis entuziasmaj pri la ideo, frate kaj humane agi kun ĉiu ajn kaj al ĉiu ajn homo en la tuta mondo. Kiom da tiuj decidoj ni ĝis nun efektivigis?

Ĉu kiel komencanto ni vere diligente lernas la internacian lingvon, por akiri ilon al frata interkompreniĝo? Ĉu ni vere kaptas ĉiun okazon sin prezentanta al plia lingva perfektigo? Ĉu ne ankaŭ ni intencis korespondi kun kiel eble plej multaj esperantistoj eksterlandaj kaj ĉu ni vere respondis ĉiam al samideano petanta respondon?

Se kulpon ni sentas, kiel senkulpigi sin?

Ĉu vere mankis la tempo, ĉu vere ni estis tro-okupitaj dejore, ĉu vere ni havis ĉiam la plej bonan volon kaj devigaj kaŭzoj malhelpis niajn bonajn intencojn?

Versajne ne, kara leganto, mi dubas.

Ĉu kiel progresintoj ni vere fariĝis grupanoj ie ajn kaj ĉiam vizitis la grupvesperojn? Ĉu ni strebis pliperfektigi buŝe kaj skribe, ĉu ni laŭpove kunagis en la gruplaboro?

Ĉu ni vere vizitis kongresojn aŭ landajn aŭ eksterlandajn, kiuj publike dokumentas per sia impona prezentado la gravecon de nia afero kaj varbas por ĝi?

Ĉu ni faris klarigojn al interesuloj, ĉu ni helpis al esperantistaj novuloj per konsilo kaj ago?

Mi dubas, ke jes!

Ĉu kiel perfektuloj ni vere klopodis uzi nian lingvon propagandcele aŭ por konvinki dubantojn kaj gajni ilin por Esperanto?

Ĉu ni abonis E-gazeton, ĉu aĉetis E-libron, ĉu ni flegis kontakton kun eksterlandanoj aŭ vizitis ilin?

Ĉu ni subtenis kaj entuziasmigis la komencantojn, kiuj tro ofte sentas sin forlasataj kaj neglektataj de la spertuloj?

Ĉu ni vere disponigis nin al instruado kaj perado de niaj spertoj al lingve ankoraŭ nespertuloj?

Ĉu ni fine restis fidelaj anoj de nia movado en E-grupo aŭ ĉu ni ekŝiĝis, ĉar ni ne plu bezonas la grupan kontakton kiel spertuloj aŭ pro iu ajn alia kaŭzo ridinda?

Mi esperas, ke ne, sed mi devas dubi, legante la supre ofertitan raportekstrakton hontigan.

Do, kara kolego esperantista! Iam vi esperis trovi kontakton kun iu ajn homo en iu ajn lando de la vasta mondo. Por tio vi lernis Esperanton, por tio vi fariĝis spertulo, per tio vi intencis fariĝi pli gaja, pli klera, pli feliĉa.

Rememoru nun kaj faru reregardon, ĉu vi ankoraŭ havas la iaman vervon, ĉu vi atingis parton aŭ eĉ grandparton de viaj celoj, ĉu vi ankoraŭ agas laŭ via libervola koncepto aŭ ĉu vi defalis aŭ forgesis kaj neglektis ĝin?



Antaŭ cent jaroj naskiĝis la geniulo Zamenhof, la kreinto de nia lingvo internacia kaj konvinkis milionojn da adeptoj kaj gajnis ilin por sia grandioza ideo. Ankaŭ vi sekvis ĝin libervole, eble sukcesis kaj povis gajni kaj doni multan bonon per Esperanto, ankaŭ vi eble spertis, „kiaj“ estas multaj.

Sed tamen aŭ ĝuste pro tio ni ĉiam denove ekagu kuraĝe, verve kaj fidele. Ni ne laciĝu, ĉar

„Ideo centjara,  
Ideo tiel klara  
Estas pensana  
Kaj neniam vana.“ (Steinig)

## Berlino invitas:

Berlino estas ankoraŭ grava centrejo de eŭropa trafiko. Tial ni prave supozas ke konsiderinda nombro da partoprenantoj de la 44a UK intencas vojaĝi tra ĝi.

Berlino ankaŭ estas urbego plena de vidindaĵoj kaj havas viglan kaj relative fortan esperantistaron. Tial ni tre ĝojus se anoj de la 44a ne nur travojaĝus sed eble restadus ĉi tie dum kelkaj tagoj.

Bedaŭrinde, Berlino ne fariĝis urbo de antaŭkongreso. Tamen, se sufiĉe da esperantistoj vizitus nin, ni povus fari interesajn aranĝojn.

Kompreneble, ni nek volas nek povas improvizi! Ni absolute ne emas renkonti subitajn taskojn neantaŭviditajn. Sed informite je ĝusta tempo, ni kaj volos kaj povos fari ĉion eblan por kontentigi kaj plezurigi niajn eksterurbajn kaj eksterlandajn samideanojn.

Ni do petas ĉiujn esperantistojn kiuj survoje al la jubilea kongreso deziras restadi en Berlino: —

### AĈETU AMASE LA KONGRESAN GLUMARKON!

La kvarkolora glumarko de la 44a Universala Kongreso en Varsovio estas desegnita de unu el la plej famaj polaj artistoj. Prezo: unu folio de 25 pecoj = 0,25 dolaro. Mendu ĉe la Landaj Asocioj au ĉe: 44a Universala Kongreso de Esperanto, Warszawa, Pollando.

Ĝen. Sekretario Prezidanto  
Jan Zawada Andrzej Rajski

Skribu tuj al la ĉi tiea delegitino de UEA por turismo, f-ino Herta Franck, Wulfila-Ufer 37, Berlin-Tempelhof, Germanujo, informante ŝin precize pri via alveno kaj pri viaj deziroj kaj aldonante internacian respondokuponon. Atentu tamen, ke ŝi ne povas helpi vin pri havigo de vizo aŭ pri ĝiro de mono.

Vizitu Berlinon, vi estos kore bonvenaj.

ESPERANTO-LIGO BERLIN  
6 H. Breitenbach

## Rekontiĝo de esperantistoj dum la VII. Monda Junularfestivalo

### Wien: Renkontiĝo de esperantistoj dum la VII. Monda Junularfestivalo

La 28an de julio 1959, en la kadro de la VII. Festivalo, okazos en Vieno (Aŭstrio) renkontiĝo de junaj esperantistoj.

La programo de la Festivalo estas tre riĉenhava kiel ankaŭ tiu de la esperanta renkontiĝo. Tamen dependas de la esperantistoj mem, ke ili faru ankoraŭ pli

### Internacia Esperanto-Muzeo Wien

petas por komplete bindiĝi „Bulteno de la GEFA“ la nron 13 el 1954.

Kiu posedas ankoraŭ tiun bultenon? Sendu ĝin al la redaktoro!

**Korespondadon** serĉas juna franca kolego kun germanaj gekolegoj.

Adreso: S-ro Marcel Sausser,  
12 Avenue Daubigny, Arnouville  
Les Gonesse (Seine & Oise),  
Francio

riĉan kaj interesan programon. Sendu al ni viajn proponojn kaj sugestojn.

Ni ankaŭ ĝoje salutos tiujn esperantistojn kiuj traveturante al la 44a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio (1-8 de aŭgusto) haltiĝos en Vieno.

Anoncu vian partoprenon al Preparkomitato de la VII. Festivalo „Esperanto“, Wien I, Seilerstätte 15, Aŭstrio

## 37a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO

atendas vin en Essen

de la 16a ĝis 18a de majo

ESSEN — la metropolo de la industria regiono ĉe riveroj Ruhr kaj Rhein, invitas al

### 37a Germana Esperanto-Kongreso — Essen 1959

manifestacio de nia germana Esperanto-movado — honora

soleno okaze de la Zamenhofa jaro. Ni havas ankaŭ la taskon honori amikon de d-ro Zamenhof kaj malavaran subtenanton de Esperanto en la unua tempo, la Essen' anon H. W. Trompeter, naskita en Essen-Rellinghausen 1839, mortinta en Essen 1901.



ESSEN valoras vojaĝon! Ĉi tiu urbo, ofte false komparata kun malhela, fumo- kaj fulgoplena fabriko amasloĝejo, prezentiĝas al vizitanto riĉa je verdaj herbejoj, arbetoj kaj arboj enmeze de la loĝkvartaloj, ĉirkaŭataj de grandaj parkarboj. La valo de Ruhr-rivero etendiĝas tra la urba distrikto; ĝi enhavas la lagon de Baldeney por banado, velado, kun tendkampoj inter arbaraj montetoj — la ideala pejzaĝo por refreŝiĝo post laborriĉaj tagoj.

Komerco, metio kaj industrio klopodas montri siajn laborejojn kiel la plej modernajn, plej agrablajn por la homoj laborantaj en ili. Multvaloraj artaĵoj troviĝas en la muzeoj kaj en la trezorejo de la pli ol miljara katedralo. — La

kultura vivo de la urbo havas altan nivelon.

Al tiu nia kongresa urbo ni invitas vin! Esperantlingvan prospekton postulu de „Amt für Wirtschaft und Verkehrsförderung, Rathaus, (22a) Essen/Germ.“

Informojn petu de  
37a Germana Esperanto-Kon-

greso Essen 1959, (22a) Essen/Germ., Postfach 465, Poŝtkonto: Essen 42871 (Esperanto-Vereinigung Essen), Bankkonto: Deutsche Bank Essen n-ro 31 650 (Esperanto-Vereinigung Essen)

#### Kotizo

kongresano · 10 gm  
familiano · 5 gm  
junul(in)o · 5 gm

### Nia prezidanto skribis al la Kongreskomitato :

Tre estimataj samideanoj!

Ni dankas pro via invito al la 37a germana Kongreso. Ni volonte partoprenus en tiu aranĝaĵo, sed tamen devas sciigi vin je nia granda bedaŭro, ke nia tuta estraro troviĝas en Aŭstrio dum la sama tempo, vizitante la inter-

nacian kongreson de la fervojoj. Tial ne estos eble al ni, aranĝi fakkunvenon. Sed ni rekomendas al niaj membroj la partoprenon pere de nia Bulteno.

Ni deziras al via kongreso plenan sukceson, kiu efiku fruktodona en la germana esperantistaro.

### Listo de estraro kaj subsekcioj de GEFA

distrikto	nomo, antaŭnomo	titolo	a) dejora adreso	telefono	b) privata adreso
Prezidanto	Gießner, Joachim	BOI	Bf Braunschweig Hbf	949/866/340	Braunschweig, Hauptbahnhof 6
Sekretariino	Kruse, Elfriede	BS	Sozialamt Frankfurt	2204	Frankfurt/M., Ackermannstr. 82
Varbado	Barnickel, Wilh.	BOI	Tarifamt Frankfurt	5601	
Kasisto	Denk, Otto	BAmtm	Prüfungsamt der BD Ffm	1510	
Terminaro	Ritterspach, Gernot	BI	Bf Heidelberg Hbf	222	Bammental b. Heidelberg, Oberdorfstr.
Redaktoro	Steinig, Paul	t.BOI	AW Bremen	835/348	
Konsilanto	Dr. Lang, Wilh.	BAmtm	Prüfungsamt der BD Ffm	1520	

Augsburg	Barmaneter, Hans	BAss	Bf Memmingen		
Essen	Schnetzer, Alfred	BAmtm	Bf Soest Hbf	944/833/391	
Frankfurt	Dr. Lang, Wilh.	BAmtm	Prüfungsamt der BD Ffm	1520	
Hamburg	Lepke, Werner	BI	BD Hamburg — B 6 —	947/5444	
Hannover	Gießner, Joachim	BOI	Bf Braunschweig Hbf	949/866/430	
Karlsruhe	Hug, Josef	BI	Ps Büro BD Karlsruhe	953/5005	
Kassel	Kail, Paul	BOI	P-Büro BD Kassel	1270	
Köln	Westfeling, Adolf	BOI	Bp-Köln	5236	
Mainz	Eisenbarth, August	t BOI	Aw Kaiserslautern	954/806/954	
München	Behr	BOS	Bundesbahnschule München	962/7563	
Münster	Brandenburg, Willi	tBI	z. Zt. Bm Emden		Münster, Wilhelmstr. 38
Nürnberg	Gößmann, Joseph	BOI	BD Nürnberg, Vt 15	966/5857	
Regensburg	Porsch, Hans	BR	BD Regensburg, Dez 4H	404	
Saarbrücken	Winkelhaus	BR	Aw Saarbrücken-Burbach		
Stuttgart	Kiebele, Anton	BS	VK II Stuttgart	952/5743	
Trier	Klaes, Anton	BS	BD Trier, Büro I g	5412	
Wuppertal	Graß, Willi	BI	Ga Solingen-Ohligs	946/840/138	



# El la grupoj

## Frankfurt (M):

Tiel kiel la kalendara indikas la festojn, tiel ili estu festataj. Je la unua dimanĉo en februaro, la karnavala dimanĉo, la frankfurta fervojista esperanto-grupo aranĝis kune kun la urba grupo gajan karnavalan vesperon en la Denis-salono de la fervoja tranoktejo, Stuttgarts trato. Oni amuziĝis je komuna kantado, gaja parolado kaj dancado. La samideanoj Denk kaj Simon ludis ŝkeĉon, verkita de D-ro Lang, en kiu la poento estis laŭdokanto pri Esperanto. Sinjorino Häbel kantis belajn solokantojn, kaj s-ano Daniel Jäger rakontis gajajn travivaĵojn al kongresoj. Ĉiuj kunagantoj rikoltis multe da aplaŭdo. Multaj „orbilantaj“ ordenoj estis disdonitaj. Al ĉiuj partoprenintoj la vespero restas en bela memoro. Denk

## Mainz:

En la jaro 1958 plimultiĝis la membronombro per enkonduko de malproksim — instruado (leterkurso) kompare al la jaro 1957 de 25 al 44 membroj. La programo, kiu estis decidita dum la kunveno en Bad Kreuznach en januaro 1958, povis esti plenumita tute ĝis fino de 1958.

Post intensiva pritrakto de la instruiletoj 1-5 oni povis komenci la korespondadon kun eksterlandaj samideanoj.

Dum 1-2 instruvesperoj po monato trastudis la unuopaj fervojistaj Esperanto-rondoj la instruiletojn.

Biblioteko kun 120 volumoj estas senkoste je dispono al ĉiuj fervojistoj esperantistaj de nia direkcia distrikto Mainz. Al la 43a UK en Mainz 1958 estis ordonita nia tre kapabla samideano Bass. Anw. Rittthaler, por deĵori dum la kongresa tempo en la fervoja stando kun la aliaj 5 GEFA -anoj.

En la Zamenhof-soleno de la distrikto Mainz en Kaiserslautern la 14an de dec. 1958 povis raportari s-ano Rittthaler tre interesajn travivaĵojn pri la kongreso. Dum la kongreso partoprenis ankaŭ diversaj grupoj — ja, el Kaiserslautern kaj Speyer — de la direkcia distrikto Mainz, la viziton de la moderna central-regardejo en Frankfurt (Main).

Kun la plej grandaj esperoj ni paŝis en la novan jaron 1959. Eisenbarth

## Rheydt

Nova grupo estas fondita.

Dum la pasinta aŭtuno mi klopodis fondi novan fervojistan Esperantogrupon kaj aranĝi kurson por komencantoj.

Helpe de la kolonia subsekcioestro mi verkis varbicirkuleron kaj dissendis ĝin al la unuopaj fervojaj deĵorejoj en Rheydt kaj Mönchen-Gladbach.

Kun 5 fervojistaj kolegoj la kurso komenciĝis la 23an de oktobro 1958. Per la afableco de la estro de la fervoja frajtekspedejo Rheydt ni povas uzi la tiean instruĉambron. Regule ĉiun duan ĵaŭdon la lecionoj okazas. La partoprenantoj lernas kun granda fervoro kaj intereso la internacian lingvon. Ni uzas la lernlibron de Wingen.

Por vigligi kaj pli interesi la instruadon antaŭ ne longe ni komencis korespondadi kun eksterlandanoj. Pere de mia ĉefa amiko ni nun korespondas kun anoj el la Esperantogrupoj MIRANDOLA/Italujo.

Ĉiuj grupanoj estas membroj en IFEF ek de januaro 1959.

Wilfried Mester  
Bf. Rheydt-Geneicken

## Saarbrücken.

Ne estis facile, entuziasmiĝi la fervojistojn en la direkcia distrikto Saarbrücken por ESPERANTO. Malrapide kreskas la nombro de la fervojistoj, kiuj kiel membroj de GEFA pledas niajn lingvointeresojn.

Malgranda sukceso estas, ke antaŭ ne longe la unua kurso komenciĝis en la instruĉambro de la ĉefstacidomo Saarbrücken.

Ĝojige estas, ke la BSW Saarbrücken estas preta, fondi esperantlingvan bibliotekon.

Nia celo estos, ĉe la tago de la ekonomia reunigo de la Sarlando pruvi, ke la subsekcio Saarbrücken ankaŭ kunmarŝos en la vicjo de GEFA kun multnombraj membroj. Winkelhaus Weiden:

Nia gruplaboro estas tre kontentiga. En novembro komenciĝis fundamenta kurso, kiun gvidas s-ano Hans Stahl. Preskaŭ ĉiuj gepartoprenantoj ĉeestas ankoraŭ kaj lernas diligente (10 pers.). La Zamenhof-Soleno, aranĝita de la Munkena esperantistaro en la monato decembro, estis por tri klubanoj bela travivaĵo, ĉar ili denove povis resti kelkajn horojn en „Esperantujo“.

Fine de februaro aranĝis nia rondo letervesperon, kiu bone sukcesis. Mi ricevis multnombrajn kartojn kaj leterojn el eksterlando. Eĉ el USONO sendis s-ano salutkarton. Sed bedaŭrinde ne unu simplan salutkarton ni ricevis

de samlandanoj aŭ germanaj fervojistaj esperantistoj. Estas honto!

Kelkaj klubanoj komencas korespondi kaj speciale por la planita XIII-a IFEF-kongreso kun s-anoj en Barcelono. Nia klubano Otto Hub instruas la progresulojn regule en senlaca maniero, tiel ke preskaŭ ĉiuj malnovaj grupanoj bone regas Esperanton buŝe kaj skribe. Ni havas la fortan intencan viziti la venontan IFEF-kongreson en Linz multnombro. En nia najbara loko Ullersricht fondis SAT-ano Fritz Jensch rondeton de kelkaj fervojistoj, kiuj diligente lernas kune kun iliaj familianoj nian belan lingvon laŭ la lernlibro „Nian lernas Esperanton“ de Wingen. König

## Wuppertal:

En la distrikto Wuppertal ekfloras freŝa vivo. Novaj kursoj okazas en Solingen-Ohligs, Opladen kaj Kreuztal. En Hagen/W. kurso estas aranĝota dum la jaro 1959.

En la urbo Wuppertal aranĝis la loka esperantosocieto, kune kun fervojistaj esperantistoj, ampleksan varbespozicion interligite kun lumbildprelego pri la pasinta mondespozicio en Bruxelles. La esperantaĵoj montritaj, inter ili objektoj el malproksimaj landoj, pruvis konkrete la multflankan uzeblecon de la internacia lingvo kaj ĝian tutmondan disvastiĝon. Dum sekvinta lumbildprelego nia fervora kamarado Bass Willecke, To-Büro, akompanis la aŭskultantaron tra la tuta Bruxella mondespozicio kaj la antikva ĉefurbo de Belgujo.

Poste parolis la merita samideano de la loka Esperantogrupoj Wuppertal, s-ro Pikard. Li gajnis la aŭskultantojn per efektplenaj vortoj:

La teknika evoluo en la tuta mondo paŝas tre rapide antaŭen. Landlimoj preskaŭ ne ekzistas, dume lingvaj baroj malebligas la interkomprenigon de homo al homo. Ne ĉiu scipovas du aŭ tri fremdajn lingvojn. Esperanto povas solvi la problemon. Esperanto farigu la dua lingvo por ĉiuj krom la gepatra lingvo. Entute la ekspozicio bone estis vizitata kaj dum lumbildprelego ĉeestis pli ol 100 personoj.

La sukceso superis nian atendon.

Kurso por komencantoj komenciĝis intertempe kun 14 partoprenantoj, gvidota de kolego Willecke en la granda salono de la BD-direkciejo.

En Kreuztal (apud Siegen) instruas BI Schneider 13 novajn membrojn.

Graß